



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Ankoraŭ estas tempo!

Aliĝu al la

Germana Esperanto
Kongreso en
Oberkirch!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 16/1975 30 aprilo 1975
Aperas ĉiusemajne

Renato Corsetti:

Pri Regiona Agado

Nu, bone, mi konsentas: "Regiona Agado" ne estas bele elpensita esprimo. Ĝi ne sugestas tion, kion ĝi devus sugesti.

Ĝi devus tuj elvoki Afrikon, Azion kaj Sudan Amerikon. Ĝi devus tuj komprenigi ke temas pri helpo al lokaj agantoj por la internacia lingvo. El ĝi oni devus ankaŭ senpere kompreni ke UEA, la centra movada motoro, ekklopodas konstrui al si ankaŭ nigran kaj flavan vizaĝojn.

Nu, ĉion ĉi oni certe ne komprenas el la multrilate pala vortumo "Regiona Agado". Tamen ĉio ĉi ja ekzistas malantaŭ la vortumo.

Jen koncize la baza "filozofia" fono de "Regiona Agado":

UEA malgraŭ sia nomo ne estas universala. En ĝi tro multe superpezas eŭropanoj. Jam estas tempo "salti" de Eŭropo al aliaj kontinentoj kaj transformiĝi de eŭropa saŭco kun kelkaj ekstereŭropaj spicaĵoj al plene miksitaj mangaĵoj.

Tio tute ne signifas flankenlasi eŭropajn esperantistojn, ne plu zorgi pri EEK, kaj simile. UEA deziras nur dediĉi eron de siaj fortoj por evoluigi la uzadon de la internacia lingvo en ankoraŭ ne malkovritaj landoj. Per tio ankaŭ eŭropanoj nerekte estas helpataj. Fine ili povos respondi la ĉiaman demandon "...tamen, kie oni parolas ĝin?" kun iom pli da fiero.

Kaj jen malgranda laborprogramo sufiĉe konkreta:

- detala esplorado pri la stato de la agado en ĉiu unuopa lando de Afriko, Azio kaj Suda Ameriko;
- klopodoj por aligi al UEA nealiĝintajn asociojn el la tri menciitaj mondopartoj;
- ellaborado de ĝenerala trarigardo pri komunaj problemoj kaj ebla helpo;
- produktado de bazaj informaj broŝuroj, kiuj prezentu la internacian lingvon konsidere de la nuntempaj sociaj kaj kulturaj trajtoj de la koncernaj mondopartoj;
- produktado de baza kursoteksto por (mem)lernado de la internacia lingvo, kiu estu facile tradukebla al lokaj lingvoj fare de lokaj esperantistoj;
- kontaktado kun neesperantistaj interesaj instancoj aŭ individuoj (lingvistikaj institutoj, gvidantoj de junularaj organizaĵoj, ktp.).

Kiel statas nun la laboroj de la komitata komisiono pri landa agado koncerne la ĉi-supran laborplanon?

Simple oni povas diri, ke Afrika estas "esplorita" kaj Azio "esplorata", dum Suda Ameriko restas alfrontenda.

Baza broŝuro "Por defendo de afrikaj kulturoj" estas produktita kaj tradukata al la malagasa.

Fri Regiona Agado (daŭrigo)

UEA intertraktas kun lokaj esperantistoj pri eldonado de vortaroj kaj gramatikoj en du-tri lingvoj, dum profesoro Szerdahelyi de la budapeŝta universitato ekpretigas provlecionojn por gramatiko tra-dukebla al la suahila, haŭsa kaj amhara lingvoj.

Fine akiradas dikecon listo de helpodonantojkaj helpopetantoj. Inter la helpodonantoj elstaras Germana Esperanto-Asocio, kiu decidis donaci 500 GM por "Regiona Agado". Kiu landa asocio sekvos?

Kion vi mem povas fari? - Se vi estas esperantisto loĝanta en Afriko, Azio aŭ Suda Ameriko, kontaktu tuj la respondeculon pri Regiona Agado kaj prezentu al li viajn problemojn.

Se vi estas esperantisto loĝanta en Eŭropo, kontaktu same la respondeculon kaj informu lin pri viaj ideoj pri "Regiona Agado" kaj pri via ebla helpo per informoj, konsiloj kaj, kial ne, per mono!

La adreso de la respondeculo estas: Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 ROMA, Italujo.

Eŭropa Politiko de la Edukado

Raporto pri la A.E.D.E.-kongreso de D-ro Prof. Mario Dazzini

"Eŭropa Politiko de la Edukado" estis la temo de la 6a Kongreso de la Eŭropa Asocio de Instruistoj (Association Europeenne des Enseignants, AEDE), kiu okazis de la 1a ĝis la 4a de aprilo 1975 en S. Remo, Italio. Ĉeestis 60 delegitoj el la landoj de la Komuna Merkato kaj 300 membroj de AEDE, ĉefe el Italio kaj el Francio, Belgio, Britujo, Germanujo, Danlando kaj Luksemburgio.

Partoprenis la kongreson, kiel membroj de AEDE la gesanideanoj Tramarollo Guisepe, Dazzini Mario, Dazzini Catina Giulia, Clelia Caterno, Gugloelminetti, Ari Valerio, Portaleone Jolanda, Madrucci Raspanti Rosa, Miccioli Laura, Pilne Eelena, Bruni Anna Maria, Chioboli Agar. Bedaŭrinde pro malsano, ne povis ĉeesti d-ro Stoppoloni Umberto.

La agado de la esperantistoj dum la tuta kongreso disvolviĝis kun-labore kaj interkonsente inter ĉiuj ĉeestantoj esperantaj gekolegoj. Laŭ sugesto de prof. Tramarollo oni decidis prezenti la materialon tajpitan kaj multobligitan fare de la sekretario de Itala Esperanto-Federacio, je nomo de ILEI kiel grava internacia instruista organizo. Pro tio oni prezentis itale kaj france ĉu la rezolucion proponon ĉu la ĝeneralan kaj resuman raportojn kaj rimarkojn pri la raporto Janne, kies teksto estis preparita de d-ro Stoppoloni.

Dum la inaŭguro ĉeestis Hon. Malfatti, itala Ministro pri Publika Instruado. Post la saluto de s-ro Sprey, reprezentanto de la Eŭropa Komunumo, d-ro Dazzini alportis la saluton de ILEI kaj legis la rezolucion proponon por ke la 6a Kongreso de AEDE decidu la starigon de studgrupo kun la aparta kaj specifika tasko pli amplekse kaj profunde ekzameni la internacian lingvo-problemon kaj objektivite kaj serioze pristudi la solvon disponeblan per internacia lingvo Esperanto. Kopio de la saluto kaj de la rezolucia propono en esperanta, itala kaj franca tekstoj estis oficiale transdonita al Hon. Malfatti, Ministro pri Publika Instruado en Italio, al prof. Alers, prezidanto de AEDE, kaj al prof. De Bartolomeis, prezidanto de la itala sekcio de AEDE.

Eŭropa Politiko.....(daŭrigo)

Posttagmeze, antaŭ la raporto de prof. Janne, la esperantistaj kolegoj disdonis kopion de la kompleta kaj resuma raporto de ILEI al la estraro de AEDE kaj al la 60 delegitoj kiuj havis voĉdonrajtojn, kaj kopion de la resuma raporto de ILEI al ĉiuj kolegoj de AEDE partoprenantaj la kongreson.

Laŭ aserto de prof. Tremarollo estis farita bonega informa laboro kaj tiamaniere oni devigis la estraron de AEDE tralegi la kompletan raporton Janne, preparita de d-ro Stoppoloni, entenante la rimarkon de la esperantistoj. Sufiĉe ofte kaj longe oni parolis en la respondoj de la du raportantoj, sed ĉefe flanke de prof. Bastianetto, pri internacia lingvo esperanto kaj ĝenerale pri la lingva problemo de la Eŭropa Komunumo.

Dum la tri tagoj de la disvolviĝo de la kongreso estis faritaj intervenoj fare de gesamideanoj Tremarollo Giuseppe, Ari Valerio, Clelia Conterno Guglelminetti kaj Madrucci Raspanti Rosa.

Estus tre utile kaj interese ricevi la tekstojn de ĉio kio estis dirita dum la kongreso ĉar vole nevole la 6a Kongreso de AEDE, kvankam en la fina rezolucio oni neniam menciis la internacian lingvon, tamen oni decidis kolekti dokumentan materialon kaj pli profunde kaj vaste pristudi la lingvan problemon flanke de komisiono en kiu povos kunlabori kaj kiun povos partopreni ankaŭ reprezentantoj de fakaj kulturaj kaj edukaj organizoj ekster AEDE.

Kiel novan prezidanton de AEDE oni elektis prof. Kech Jean Camille, Avenue de la Rousselière 6bis, B-4500 Jupille sur Meuse, Belgio.

Oni anoncis, ke en Bruselo oni starigis flanke de la Eŭropa Komunumo la Eŭropan Centron pri Edukado kaj, se oni bone komprenis, ŝajnas ke la laborojn de tiu Centro kaj speciale de la Komisiono pri la lingva problemo, povos partopreni ankaŭ reprezentantoj de ne-registaraj internaciaj organizoj kiuj okupiĝas pri lingvistikaj kaj edukaj problemoj. Estus oportune esplori surloke la eblecojn por eventuala kunlaborado flanke de ILEI kaj de la diversaj landaj sekcioj de ILEI en la nacioj de la Komuna Merkato.

Bedaŭrinde oni ne sukcesis ricevi kopion de la fina rezolucio de AEDE, sed ĝi aperos baldaŭ en la ĵurnalo de AEDE. En la kadro de la kunlaboro kun AEDE kaj kun oficialaj eŭropaj instancoj kaj en Bruselo kaj en Strasburgo kaj en Luksemburgio, estas konsilinde ke la Eŭropa komisiono de Itala Esperanto-Federacio interkonsente kun la Eŭropa Esperanto-Centro (Frederikslaan 47, NL-1719 Schoorl, Nederlando) esploru la eblecojn por ke esperanta reprezentanto ĉestu la laborojn de la komisiono pri la eŭropa lingva problemo de la Eŭropa Centro pri Edukado en Bruselo.

Oakze de la Internacia Konferenco de ILEI en Krogerup Hojskole en Humlabaek, Danlando, de la 18a ĝis la 25a de julio (S-ro Ejnar Langkilde, Bøl Colles Alle 4, DK-2960 Rungsted Kyst) estas antaŭvidita ampleksa diskuto pri la intensigo de kunlaboro inter ILEI kaj AEDE.

Zamenhofa Memorkunveno en Vieno

Vieno (pp/kb) la 12an de aprilo 1975 okazis la jam tradicia Zamenhof-memorkunveno en la Pola Instituto de Vieno. Salutvortojn al la ĉeestintoj, inter ili polaj gastoj, direktis Mag. Jerzy Passendorfer, la direktoro de la Pola Instituto, kaj Walter Mudrak. Pri la studtempo de Zamenhof en Vieno prelegis d-ro Karl Beckmann.

Jaro de la Jartridekoj (pp)

Ĉi-jare oni multe parolas pri jartridekoj, pri 30-jaraj datrevenoj de liberiĝo, de venkoj, speciale en Pola Radio, kiu decidiĝis konkurson al tiu temo.

Sed eble estas interese, kiel pensas la neŭtrala Aŭstrio pri tiu datreveno. Mi nur esperas, ke ne ekestos tro multe da plendoj pri politikumado sur tiu paĝo. Sed informi pri la enhavo de Esperanto-elsendoj ja ankaŭ estas informado.

Jen do la semajna komentario de d-ro Alfred Macher de la 26/27 aprilo 1975 en la elsendoj de Radio Vieno:

"Antaŭ tridek jaroj renaskiĝis Aŭstrio el la milita ĥaoso. La generacio, kiu kunagante travivis tiujn neforgeseblajn tagojn, ekkonscias surprizite, ke pasis jam tiom da tempo, ke por la juna generacio ili estas historio sen iu por ĝi persona, vivanta rilato.

Kiu ŝanĝo ekde tiam! Nuntempe Aŭstrio havas bone funkciantan demokration, florantan - malgraŭ la mondkrizo! - ekonomion kaj voĉon ĉie atentatan. Ĝi estas eterne neŭtrala, sed - laŭ sia propra koncepto - a k t i v e neŭtrala.

Tamen ne sufiĉas teoria principo. Post la evoluigo de nia ekonomio ni devos fortigi nian defendkapablon, aĉetante tre multekostajn aviadilojn de la nova interkaptaj tipo. Ni bezonas ilin, se ni vere povu nin defendi. Tion ankaŭ Moskvo fine komprenos, kiu ankoraŭ ne konsentis, ĉar la ŝtatkontrakto, ratifita antaŭ 20 jaroj, malpermesas al ni raketojn - sed raketoj estas esenca trajto de la interkaptaj aviadiloj.

Per historiaj armiloj, nur por muzeoj taŭgaj, ni ne povos ŝirmi nian respublikon kontraŭ la danĝero de rea detruo. En tiu senco la 30-jara jubileo estu admono ankaŭ por niaj junaj sampatrianoj. La konscio pri tiuj tridek jaroj revigligu, plie, nian sencan de solidareco - ni ja ĉiuj apartenas unu al la alia. Tiam ankaŭ la kampanjo por la aŭtunaj elektoj, decidaj - verŝajne - pri nia estonteco, okazos demokrate en la tiom dezirinda atmosfero de vere deca lojaleco - kiel ĉiam antaŭe.

Antaŭ 30 jaroj neniu povis esperi, ke iam Aŭstrio tiel prosperos, kiel dank' al tia solidareco ĝi efektive prosperis kaj ankoraŭ prosperas. Se ni zorgas, ke tiu tenenco pludaŭru, ni rajtos trankvile fronti la tempojn venontajn."

60 por 5a Kultura Semajnfino

Saarbrücken (pp) Pli ol 60 personoj partoprenas la 5an Kultureman Semajnfino de Sarlando Esperanto-Ligo, okazanta de la 2 - 4 majo en Blieskastel-Niederwürzbach. 4 ŝtataj resp. publikaj instancoj, inter ili la ĉefministro de Sarlando, donis financajn subvenciojn.

Songŝo - realigita en Augsburg

Augsburg (pp) Estus iluzio kredi ke al "tago de malfermita pordo de Esperanto" venas amaso da ne-esperantistoj. Tamen la ekzemplo de Augsburg, dimanĉe la 27 aprilo, denove montris ke oni povas altiri kelkajn interesulojn. Inter ili estis virino, ne plu tro juna, kun juna akompanantino, kiu alogita de varbafiŝo sur la strato venis por informiĝi. Kaj tiu sinjorino konfesis, ke antaŭ 40 jaroj ŝi jam aŭdis ion pri Esperanto kaj ke ŝi antaŭ du semajnoj pro iu ajn kaŭzo eĉ songis pri Esperanto. Pro tio ŝi estis ege surprizita, ke ŝi veninte de alia loko promenante tra la stratoj de Augsburg ekvidis la Esperanto-afiŝon. Ŝi nun kaptis la okazon, aĉetis lernolibron kaj nun volas lerni Esperanton!